



# Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2017 (211) 28. 11. 2017

## 25 let nakladatelství KAVA-PECH



Foto: Luděk Neužil

13. listopadu 2017 se konala v sídle Jednoty tlumočnicků a překladatelů v Praze oslava 25. výročí založení nakladatelství KAVA-PECH. Tato kulturní událost byla spojena s uvedením dvou nových publikací, konkrétně čtvrtého vydání *Slovensko-českého a česko-slovenského slovníku na cesty* a *Velkého esperantsko-českého slovníku*.

(>>> str. 2 a 3)

### EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj .....	2
Absoluta pruvo .....	6
Trompo .....	9
Volvolánek en retrospegulo .....	11
Jungmann en tenebra nokto .....	12
Venis la Kristnasko .....	15
Sezonaj sonetoj .....	16

### O časopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980  
Vydatel: Klub esperantistů v Praze  
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7  
Vychází třikrát ročně  
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>  
Redaktor: Tomáš Břicháček  
Korektury: Pavol Petřík, Markus Beyer  
Kontakt: [t.brichacek@seznam.cz](mailto:t.brichacek@seznam.cz)

Hojně navštívená akce proběhla v příjemné a přátelské atmosféře. Jádrem oficiální části byla poutavá přednáška Petra Chrdleho o historii nakladatelství. Následovala prezentace uvedených knižních novinek. Patronem *Velkého esperantsko-českého slovníku* se stal předseda našeho klubu, patronem druhé publikace tajemník JTP Petr Kautský. Milým zpřestřením večera byl zpěv Pavly Dvořákové, které se podařilo rozezpívat publikum českými, slovenskými a dokonce i esperantskými písněmi.

Nakladatelství KAVA-PECH vydalo první publikaci v říjnu 1992. V roce 2016 bylo zapsáno do české knihy rekordů jako české nakladatelství vyvážející své tituly do nejvíce zemí všech kontinentů, a to především zásluhou vydávané literatury psané esperantem.



## POZVÁNKA

na oslavu 25 let nakladatelství KAVA-PECH

spojenou s veřejným křtem nově vydaných slovníků  
ve spolupráci s Jednotou tlumočnicků a překladatelů

V budově sídla JTP, Senovážné náměstí 23, sál č. 16  
v pondělí 13. 11. 2017 od 17:00 hodin



### Slovensko-český a česko-slovenský slovník na cesty

Autori: Vladimír Němec, Magdaléna Feřňáková

190 stran, 115 x 165 mm

Slovník rozdílých slov a frází. Neocentelná pomůcka  
pro všechny, kdo se pohybují v druhé části naší křivé  
společné republiky.

### Velký esperantsko-český slovník

Autor: Miroslav Malovec

583 stran, 145 x 205 mm

Obsahuje cca 16 000 hesel a 40 000 odvozenin,  
v menším rozsahu i příklady použití a frazeologii.  
Doplňen stručnou mluvicí esperanta.

Součástí bude prodejní výstava knih z nakladatelství KAVA-PECH  
úje od 16:00 hodin) s příležitostními slovníky

Hudební vložka a příspěvek se skromným pohostěním.



## Proslov Tomáše Břicháčka na oslavě

Dámy a pánové, vážení přátelé,  
je mi velkou ctí a potěšením, že dnes mohu být  
s Vámi při této příležitosti, a že mi zde Petr Chrdle  
přidělil zvlášť milou úlohu.

Nejprve bych chtěl jménem celého Klubu  
esperantistů v Praze poblahopřát nakladatelství  
KAVA-PECH k velkému výročí. Všichni si velmi  
vážíme jeho jedinečného přínosu pro esperantskou  
literaturu a vůbec pro kulturní život esperantistů  
v České republice i ve světě. Do dalších let mu  
přejeme hodně obchodního štěstí a mnoho  
kvalitních a úspěšných publikací.


Ale teď už k dílu, které dnes uvádíme do světa:

Významný anglista a lexikograf Josef Fronek

nedávno prohlásil: „Psaní slovníků je nesmírně těžká a nevděčná práce. Vytvoření zcela nového slovníku většího rozsahu ukrojí člověku ze života mnoho let, někdy i celé dekády. Jde o dlouholetou mravenčí nádeničinu, která desítky let doslova diktuje jak lexikografovi, tak i jeho rodině specifický rytmus života.“ Fronek také připomněl několik století stará slova francouzského učenice Josepha Scaligera, podle kterého by nejhorší zločinci „neměli být popravováni, ani posílání na nucené práce, ale měli by být odsouzeni k psaní slovníků, protože tato práce zahrnuje všechna muka, kterými lze zločince trestat.“

I když v případě Mirka Malovce a jeho spolupracovníků si myslím, že to bylo trochu jinak, a dokonce ho podezírám z toho, že mu tahle práce přinášela radost a zábavu, nic to nemění na majestátnosti jeho díla. Autor si každopádně zaslouží naše uznání, obdiv a poděkování.

Velkému esperantsko-českému slovníku přeji, aby si našel svoje místo v knihovně každého českého esperantisty, aby se stal páteřním dílem tuzemské esperantské jazykovědy a v neposlední řadě, aby se dobře prodával.



## **Anotace**

V nakladatelství KAVA-PECH vyšel velký esperantsko-český slovník od Miroslava Malovce. Dosud nejrozsáhlejší u nás vydaný esperantsko-český slovník, obsahující cca 16 000 hesel a 40 000 odvozenin, v menším rozsahu i příklady použití a frazeologii, dále stručnou mluvnici esperanta a pro případné zahraniční uživatele i stručnou mluvnici češtiny. Vedle výrazů z obecného jazyka najdeme i odborné termíny technické, lékařské, botanické, zoologické, právnické, ekonomické v rozsahu běžném u velkých všeobecných slovníků.

---

## **Esperantistoj kuris por „Paraple“**

Vlasta Piščíková

La membroj de E-mental' partoprenis la karitatan aranĝon „Kuro por Paraple“, kiu okazis dimanĉe la 18-an de junio 2017 en Prago.

La projekto „Paraple“ helpas al homoj kun paraplegio kaj informas la publikon pri ilia vivo. La kuro okazis ĉijare jam la 18-an fojon, sed la unuan fojon partoprenis ankaŭ grupo de esperantistoj.

La aranĝo konsistas el du partoj. 5-kilometra kuro kaj simbola 100-metra kuro.

Du bravuloj – Jitka kaj Tomasz – partoprenis la 5-kilometran kuron. Ili bone reprezentis ĉiujn esperantistojn! Ili ambaŭ estis eminentaj kaj Tomasz eĉ estis la kvara plej bona kuranto de la konkurso! Resto de Esperanto-grupo kuris simblan 100-metran kuron. Ĉiuj herooj sukcese kaj ĝoje atingis la celon!

Estis bele helpi, sed ankaŭ kune travivita posttagmezo ĝojigis ĉiujn partoprenantojn!

Venontjare ni certe partoprenos denove! Ĉu vi iros kun ni?

---

## **Sukcesa „Helpu helpi 2017“**

Vlasta Piščíková

La 28-an de junio 2017 okazis jam la kvara aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por la karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago. Ni kolektis monon por 33 brikoj! La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simblan muron, kiu staris meze de Prago, en strato, kiun ĉiutage trairas amasoj da turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotis niajn Esperanto-brikojn, kaj do oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj. Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke! Apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj ne hezitis sendi monon!!!

## Aranĝoj kaj okazintaĵoj en la jaro 2017

- 21/01/2017 – E-mentala socia aranĝo *1-a tosto por Zamĉjo* en Hradec Králové
- 28/01/2017 – E-mentala socia aranĝo *2-a tosto por Zamĉjo* en Plzeň
- 03/02/2017 – E-mentala socia aranĝo *3-a tosto por Zamĉjo* en Litovel
- 09/02/2017 – Jan Šebetovský prezentis malnovajn filmojn el E-aranĝoj malkovritaj en la ŝranko en la klubejo (*klubejo*)
- 23/02/2017 – prelego de Lucie Karešová pri Viktor Emanuel Frankl (*klubejo*)
- 23/02/2017 – 1-a lingva seminario de Esperanto por aktivuloj (*klubejo*)
- 25/02/2016 – tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental' en la praga bestĝardeno kun festo de la „adoptotago“ kaj granda konkursa pikniko
- 04/03/2017 – E-mentala socia aranĝo *4-a tosto por Zamĉjo* en Ústí nad Labem
- 09/03/2017 – prelego de Tomáš Břicháček pri la nova palaco *Europa* en Bruselo
- 23/03/2017 – 2-a lingva seminario de Esperanto por aktivuloj (*klubejo*)
- 17-19/03/2017 – E-mentala socia kaj gastronomia aranĝo *11-a BIERo* en Náchod
- 23/03/2017 – 2-a lingva seminario de Esperanto por aktivuloj (*klubejo*)
- 23/03/2017 – eldonita Bulteno No. 1/2017
- 26/03/2017 – E-mentala socia aranĝo *5-a tosto por Zamĉjo* en Beroun
- 29/03/2017 – Vlasta Piščíková, Jan Šebetovský kaj Vít G. Mišurec transdonis al Zdeněk Svěrák Esperantan tradukon de la teatra ludo *Dobytí severního pólu*
- 08/04/2017 – E-mentala socia aranĝo *6-a tosto por Zamĉjo* en Lipník n. B.
- 18/05/2017 – prelego de Petr Chrdle pri František Vladimír Lorenc (*klubejo*)
- 18/05/2017 – 3-a lingva seminario de Esperanto por aktivuloj (*klubejo*)
- 27/05/2017 – E-mentala socia aranĝo *7-a tosto por Zamĉjo* en Zruč nad Sázavou
- 31/05/2017 – prelego de Giorgio Silfer pri la historio de la Esperanta literaturo (*Unitaria, Praha*)
- 15/06/2017 – eldonita Bulteno No. 2/2017
- 18/06/2017 – E-mentalanoj partoprenis la kuron por Paraple
- 28/06/2017 – E-mentalanoj partoprenis la karitatan projekton Briko
- 04/07/2017 – E-mentala socia aranĝo *8-a tosto por Zamĉjo* en Brno
- 30/07/2017 – E-mentala socia aranĝo *9-a tosto por Zamĉjo* en Rakovník
- 27/08/2017 – E-mentala socia aranĝo *10-a tosto por Zamĉjo* en Č. Budějovice

07/09/2017 – aŭtora legado de „pikantaj someraj rakontoj“ de Tomáš Břicháček (*klubejo*)

14/09/2017 – prelego de Petr Chrdle pri Zamenhof en la sinagogo de Maisel

17/09/2017 – E-mentala socia aranĝo *11-a tosto por Zamĉjo* en Liberec

24/09/2017 – E-mentala socia aranĝo *12-a tosto por Zamĉjo* en Chrudim

25/09/2017 – Prelego de Petr Chrdle pri produktado de libroj en la Eo-muzeo en Svitavy

28/09/2017 – E-mentala socia aranĝo *13-a tosto por Zamĉjo* en Prago

05/10/2017 – prelego de Petr Chrdle pri Zamenhof (*klubejo*)

06-08/10/2017 – E-mentala socia kaj gastronomia aranĝo *12-a BIERo* en Kopřivnice

13/10/2017 – Prelego de Petr Chrdle pri F. V. Lorenc en lia naskiĝvilaĝo Zbyslav (Vrdy)

28/10/2017 – E-mentala socia aranĝo *14-a tosto por Zamĉjo* en Ostrava

05/11/2017 – E-mentala socia aranĝo *15-a tosto por Zamĉjo* en Svitavy

07/11/2017 – Prelego de Petr Chrdle pri Komenio kaj Zamenhof (*Unitaria, Praha*)

13/11/2017 – Festo de 25 jaroj de KAVA-PECH kaj prezento de du novaj libroj (*JTP, Praha*)

28/11/2017 – eldonita Bulteno No. 3/2017

03/12/2017 – E-mentala socia aranĝo *16-a tosto por Zamĉjo* en Pardubice

14/12/2017 – Zamenhofta kaj kristnaska festo en Prago

14/12/2017 – Ekspozicio de Esperanto-libroj KAVA-PECH ene de la Kristnaska lingva foiro en Prago

15-17/12/2017 – 5-a Granda lokŝumado en Bratislavo

Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové **členské příspěvky na rok 2018**. Výše ročního příspěvku činí **100 Kč**; pro studenty a seniory **80 Kč**. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na **bankovní účet č. 2801096435/2010**. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, [misuj@email.cz](mailto:misuj@email.cz).

### **Termíny schůzek klubu leden – červen 2018**

Leden: 11. 1., 25. 1. / Únor: 8. 2., 22. 2. / Březen: 8. 3., 22. 3.

Duben: 5. 4., 19. 4. / Květen: 3. 5., 17. 5., 31. 5. / Červen: 14. 6.

# LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

## **Absoluta pruvo** *Rakontoj el la dua poŝo*

Karel Čapek

„Sciu, Antoĉjo,“ diris enketjuĝisto Mates al sia plej intima amiko, „ĝi estas afero de sperto; mi kredas al neniuj elturniĝoj, neniun alibion kaj neniun rakontadon; mi kredas nek al akuzito, nek al atestantoj. Oni mensogas, eĉ se oni ne volas; do ekzemple iu atestanto ĵuras al vi, ke kontraŭ akuzito li ne havas ian malamikecon, kaj dume mi mem scias, ke en la anim-profundo, sciu, en la subkonscio, li malamas lin pro ia subpremita malamo aŭ ĵaluzo. Ĉio, kion depozicias akuzito al vi, estas anticipe elpensita kaj artifika; ĉio, kion atestanto depozicias al vi, povas direktiĝi de konscia aŭ eĉ subkonscia intenco al akuzito helpi aŭ kulpogravigi. Mia kara, tion mi konas: homo estas tre mensogema kreitaĉo.“

„Al kio do mi kredas? Al hazardo, Antoĉjo; al la senintencaj, senvolaj aŭ, kiel diri tion, al nekontrolataj emocioj aŭ agoj aŭ vortoj, kiuj al oni iam tiam eskapas. Ĉio estas falsebla aŭ alĝustigebla, ĉio estas afekto aŭ ia plano, nur hazardo ne; ĝi estas unuavide ekkonebla. Mi havas jenan metodon: mi sidas kaj lasas homojn rakontaĉi, kion ili antaŭe elpensis kaj preparis; mi mienas, kvazaŭ mi kredus al ili, ankoraŭ mi helpas al ili, por ke ilia buŝo pli bone funkciu, kaj embuskas, ĝis eskapas de ili iu senintenca, nevolita vorteto; sciu, por tio oni devas esti psikologo. Iu enketjuĝisto havas taktikon konfuzi akuziton; tial li senĉese enmiksiĝas en la parolon kaj embarasas lin tiel, ke tiu stultigito fine konfesas eble ankoraŭ tion, ke li murdis imperiestrinon Elizabeta. Mi volas absolutan certecon; tial lantete, pacience mi atendas, ĝis el la sistema mensogado kaj elturniĝado, kiun fake oni nomas depozicio, ekbrilas pretervola ereto da vero. Sciu, neta vero en ĉi tiu larma valo aperas nur pro misatento: nur se iu homa estaĵo iel parolperfidas sin aŭ mistrafas.“

„Aŭdu, Antoĉjo, antaŭ vi mi havas neniujn sekretojn; ja ni estas amikoj ekde nia bubaĝo - vi scias, kiel oni batregalis min, kiam mi frakasis fenestron. Al neniuj mi tion diris, sed mi tiom hontas pro io, ke ĝi devas eliĝi el mi; estas vane, oni bezonas konfesi. Mi diros al vi, kiel ĉi tiu mia metodo ĵus nun pruviĝis en mia... en mia plej privata vivo; koncize en mia edzeco. Kaj poste diru al mi, mi petas vin, ke mi estis idioto aŭ krudulo; mi meritas tion.

„Homo, mi... nu, mi suspektis mian edzinon Marteta; mallonge, mi ĵaluzis kiel frenezulo. En mia kapo fiksiĝis, ke ŝi havas ion kun tiu... kun tiu juna... mi nomas lin Arturo; mi opinias, ke vi eĉ ne konas lin. Atendu, mi estas neniuj negro; se mi certe scius, ke ŝi amas lin, mi dirus, Marteta, ni disiros. Sed jen la plej malbona, neniun certecon mi havis; Antoĉjo, vi eĉ ne scietas, kia turmento ĝi estas. Miadio, tio estis malbela jaro! Vi scias, kiajn stultaĵojn faras tia ĵaluzo edzo: spionas, embuskas, enketas servistinojn, faras scenojn... Kaj nun imagu al vi, ke mi estas hazarde enketjuĝisto; homo, mia familia vivo dum la lasta jaro, tio estis konstanta kruc-enketado de mateno ĝis... ĝis rea enlitiĝo.“

„La akuzitino, mi volas diri Marteta, kondukis brile; eĉ kiam ŝi ploris, ankaŭ kiam ŝi ofendite silentis, kaj kiam ŝi rakontis, kie ŝi dum la tuta tago estis kaj kion ŝi faris, vane mi gvatis, ke ŝi iel senvole konfesos ion aŭ parolperfidos sin. Sciu, ŝi mensogis ofte al mi, mi volas diri, ŝi mensogis ordinare, sed tio jam estas tia virina kutimo; virino ne diros al vi ĝuste, ke ŝi estis du horojn ĉe modistino - ŝi elpensas, ke ŝi estis ĉe dentisto aŭ en tombejo ĉe tombo de la panjo. Ju pli mi turmentis ŝin - Antoĉjo, ĵaluza viro, tio estas pli malbona ol rabia hundo – ju pli mi ŝin tiranaĉis, des malpli da certeco mi havis. Ĉiun ŝian vorton, ĉiun ŝian elturniĝon mi dekfoje inversigis kaj sekcis; sed mi trovis nenion, nur la kutimajn intencajn duonverojn kaj duonmensogojn, el kiuj konsistas la normala homa kontakto kaj la edzeco speciale, nu vi scias. Mi scias, kiel estis ĉe tio al mi, sed konsiderante, kion dume suferis povrulino Marteta, homo, plej ŝate mi vangofrapus min.“

„Do nunjare veturis Marteta al Františkovy Lázně - sciu, la virinaj aĵoj kaj tiel, mallonge ŝi aspektis mise. Memkompreneble, mi igis ŝin gardi - ian fian ulon mi salajris, kiu cetere tie nur sidaĉis en gastejoj... Estas strange, kiel la tuta vivo koruptiĝas, se io kun vi en iu sola afero ne estas en ordo; oni estas tute malpura, se oni havas makulon sur alia loko. Marteta skribis al mi... iel tiel necerte kaj timide... kvazaŭ ŝi ne scius pri kio; memkompreneble, la leterojn mi analizaĉis kaj serĉis inter linioj... Do foje mi ricevis de ŝi leteron, adreso estis 'Francisko Mates, enketjuĝisto' kaj tiel plu; kaj malferminte ĝin kaj eliginte ŝian leteron, mi vidas titolon: 'Kara Arturo!'

„Homo, miaj manoj sinkis. Do jen fine ĝi estas. Okazas iam, kiam oni skribas plurajn leterojn, ke oni ilin mise enkonvertigas. Sciu, Marteta, kia stulta hazardo, ĉu? Knabo, preskaŭ mi ŝin kompatis, ke tiel ŝi donis sin en miajn manojn.“

„Ne opiniu, Antoĉjo, mia unua penso estis, ke la leteron, destinitan al... al tiu Arturo, mi ne legu kaj resendu al Marteta; ĉiukaze mi farus tion, sed la ĵaluzo estas malpura pasio kaj fiaĵo; amiko, la leteron mi tralegis kaj montris ĝin al vi, ĉar mi ĝin kunportas. Do rigardu, kio enestas:

*Kara Arturo,  
ne koleru, ke ankoraŭ mi ne respondis al vi; sed mi havis zorgojn, ke Francjo - „tiu do estas mi, ĉu vi komprenas?“ - tiel longe ne skribis; mi scias, ke li havas multe da laboro, sed kiam oni estas tiel longe sen informoj pri sia edzo, oni iradas do kiel korpo sen animo; sed tion vi, Artuĉjo, ne komprenas. Venontan monaton Francjo alveturos ĉi tien, do ankaŭ vi povus tien ĉi alveni. Li skribas al mi, ke nun li havas tre interesan kazon, sed ne skribis kion, sed mi opinias, ke ĝi estas la murdo fare de Hugo Müller; tio min tre ege interesus. Tiom mi bedaŭras, ke Francjo iom fremdiĝis al vi, sed nur tial, ĉar li havas multe da laboro; se estus kiel iam, vi povus lin preni inter homojn aŭ aŭte ekskursi. Ĉiam vi estis al ni tiel bona kaj ankaŭ nun vi ne forgesas, kvankam ĝi ne estas tia, kia ĝi devus esti; sed li, Francjo, estas tiel nervoza kaj stranga. Ankaŭ vi ne skribis al mi, kion faras via knabinjo. Francjo ankaŭ plendas, ke en Prago estas ega varmo; li devus veturi ĉi tien kaj senŝarĝiĝi, sed certe li sidas ĝisnokte en*

*oficejo. Kiam vi veturos al maro? Mi esperas, ke vi kunprenos vian knabinjon; vi ne scias, kio estas, se ni virinoj nostalgias.*

*Kore vin, Artuĉjo, salutas via*

*Marta Matesová*

„Do, Antuĉjo, kion vi diras al tio? Mi scias, ĝi estas neniel sprita letero; ĝi estas tute malforta faro laŭ vidpunkto stila kaj de interesaĵo; sed, homo, kian lumon ĝi ĵetas je Marteta kaj ŝia rilato al tiu povrulo Arturo. Neniam mi tiom kredus al ŝi, eĉ se ŝi dirus ion ajn; sed ĉi tie mi havis en la mano ion tiel senintencan, tiel preter ŝia voĉo... Do vidu, ke la vero, netrompa kaj senduba, aperas nur pro misaranĝo. Mi estus plorinta pro ĝojo - kaj same pro honto, ke tiel stulte mi ĵaluzis.“

„Kion poste mi faris? Nu, per ŝnureto mi ligis aktojn pri murdo fare de Hugo Müller, fermis ilin en tirkeston kaj tagon poste mi estis en Františkovy Lázně. Kiam Marteta min ekvidis, ŝi ekruĝis kaj ekbalbutis kiel knabineto; ŝi aspektis, kvazaŭ ŝi farus ion teruran. Mi nenion. 'Franĉjo,' diris post momento Marteta, „ĉu vi ricevis mian leteron?' - 'Kian leteron,' mi miras. 'Vi skribas al mi diable malmulte.' - Marteta rigardas min embarasite kaj elspiras, kvazaŭ ŝi senŝarĝiĝus. 'Do verŝimile mi forgesis sendi ĝin al vi,' ŝi diris kaj estis serĉanta en mansaketo, ĝis ŝi eltiris ian iom ĉifitan folion. Ĝi komenciĝis per vortoj: ‚Kara Franĉjo!' Mi devis ridi en mia animo. Sinjoro Arturo verŝimile jam resendis, kio ne apartenis al li.“

„Poste eĉ ne unu vorto estis dirita pri tio; memkompreneble mi komencis rakonti al ŝi pri la krimo de Hugo Müller, kiu ŝin tiom interesis. Mi opinias, ke ĝis nun ŝi kredas, ke la leteron mi nepre ne ricevis.“

„Nu, kaj jen ĉio; de tiu tempo estas almenaŭ ĉe ni trankvilo. Diru, ĉu mi ne estas idioto, ke mi tiel krude ĵaluzis? Sciu, nun mi klopodas al Marteta tion kompensi; nur el la letero mi vidis, kiel ŝi, povrulino, zorgas pri mi. Do nun ĝi estas ekstere; oni pli hontas pro sia stulteco ol pro siaj pekoj.“

„Sed jen klasika ekzemplo, kian pruvoforton havas tia absoluta kaj senvola hazardo, ĉu?“

\* \* \*

Proksimume en la sama momento diris juna viro, ĉi tie nomata Arturo, al sinjorino Marteta: „Nu, knabinjo, ĉu ĝi helpis?“

„Kio, karulo?“

„Tiu letero, kiun vi tiam kvazaŭ misatente sendis al li.“

„Helpis,“ diris sinjorino Marta kaj enpenŝiĝis. „Sciu, knabo, mi eĉ hontas, kiel li, Franĉjo, tiom ege kredas al mi. Ekde tiu tempo li estas je mi tiel bona... La leteron li senĉese portas sur sia koro.“ Sinjorino Marta ektremis. „Estas fakte terure, ke... ke mi lin trompas, ĉu vi ne opinias?“

Sed sinjoro Arturo tion ne opiniis; almenaŭ li asertis, ke nepre ne.

El la libro *Rakontoj el la dua poŝo*  
Tradukis Josef Vondroušek



## Trompo *Somera rakonto*

Tomáš Břicháček

Estis somero 1992 kaj mi estis freŝe dekjaraĝa. Kiel kutime mi pasigis la komencon de la ferioj kun miaj geavoj en Struhařov proksime de Prago en unu arĥaiganta entreprena ripozejo, kiu ankoraŭ pretervivis el la tempoj de la komunisma reĝimo.

Estis ferioj riĉaj je eventoj kaj travivaĵoj. Markis ilin la ekscitita politika situacio, kiam ĉiutage oni pritraktis la sorton de la ĉeĥo-slovaka federacio. Ankaŭ mi rememoras pri la granda ekzalto, kiam mi malfermis linian kajeron kun verda kovrilo kaj komencis plenskribi ĝin kun miaj unuaj literaturaj provverkoj. Estis belega vetero kaj en miaj oreloj sonis unu sugesta kanto: *Queen Elizabeth pendolas sur la ondoj de Atlantiko. Kun ĝi vi spertos la mondon de belaj kaj misteraj momentoj...*

Mi havis tie amikinon Karolína, iomete pli aĝa ol mi, nepino de iu konatulino de mia avino. Ni bicikladis, baniĝadis en fiŝlago, ludadis Dempsey kaj Makepeace, ŝteliradis en alta herbo, nokte ni observadis lampirojn kaj ĝenerale ni faradis multe da aliaj petolaĵoj.

Tiun sezonon alviciĝis al ni ankoraŭ iu certa Blanka, knabino de najbara vilaĝo. Karolína iam venigis ŝin; mi ne scias, kiel ili du interkonatiĝis. Blanka estis dekunu-jara. Ŝi estis linda brunharulino kun friponetaj okuloj kaj por sia aĝo ŝi aspektis sufiĉe mature. Sub la ĉemizo ŝi jam malrapide komencis pleniĝi al la beleco. Ŝi rigardis min tute alimaniere ol mia infana amikino – tiel strange, mistere, kun rido, kiun mi nur post kelkaj jaroj scipovus nomi koketa.

Unu varmegan posttagmezon ni tri iris al la fiŝlago. Ni dismetis bantukojn kaj lankovrilojn sur herbo apud betuloj, blovplenis matracojn kaj rapide ĵetis nin en akvon. Estis agrabla refreŝiĝo. Ni naĝis ĝis la alia bordo apud la barilpordo kaj reen, ni sunumis sur matracoj, mergiĝis, saltis kapantaŭen de flosanta platformo.

Ni elakviĝis kaj revenis al niaj lankovriloj. Blanka ĉirkaŭis sin per granda bantuko, sub ĝi ŝi seniĝis de sia banvesto kaj metis ĝin por sekigi sur la herbon. Supre ŝi prenis ĉemizon, ĉirkaŭ la talio ŝi lasis nur la bantukon. Denove ŝi tiel strange rigardis min, kvazaŭ ŝin interesus, kion mi diras pri tio.

Poste ni ludis „trompon“,<sup>1</sup> kiun Blanka instruis nin. Estis simpla ludo kun kanastaj kartoĵoj. Ĉiuj ricevas egalan nombron da kartoĵoj. La unua ludanto metas iun koloron. La aliaj poste metas ĉiam po unu karto facon malsupren kaj ŝajnigas, ke ĝi havus la saman koloron, ĉu estas vero aŭ ne. Tiu, kiu ludvicas kaj suspektas, ke la antaŭulo trompis, povas kontroli la karton. Se la antaŭulo trompis, li estas punita per tio, ke li devas preni la tutan

---

<sup>1</sup> Ĉeĥe oni diras *švindl*.

amaseton de kartoj. Se male la koloro estis ĝusta, la amaseton prenas la malfidemulo. Gajnas tiu, kiu malŝargas sin de ĉiuj kartoj.

Eblas, ke mi ne memoras la ludregularon precize, sed tion ceteran tute klare. Mi suprenturnis la karton, kiun metis Blanka. La koloro estis ĝusta kaj mi devis preni dikan amason de kartoj. Blanka, kiu tiel jam fakte estis venkonta, ekridis kaj ĝoje svingis sin ĉedorsen kaj tondilmovis siajn kruojn. Kaj kiam ŝi estis levanta la kruojn supren, la bantuko faldiĝis kaj... (!!!). Do kaj mi haste trarigardis ĉion, kio tiel bele prezentiĝis.

Kion diri pri tio? Tiam en la varmega posttagmezo ĉe la Struhaŝova fiŝlago mi havis la impreson, ke la vivo ĵus komenciĝas.

Blanka aliĝis al ni ankoraŭ la sekvantan someron. Sed poste mi neniam revidis ŝin kaj mi scias nenion pri ŝia estonta vivo. Mi divenus nur tion, ke ŝi ne retenis siajn dolĉajn virinajn misterojn al si longe.



Ilustraĵo de Pavel Rak

## Volvoláneĉ en retrospegulo *Somera rakonto*

Tomáš Břicháček

Unu sombran tagon en julio 2017 mi kun mia edzino kaj infanoj faris ekskurson al Kutná Hora. Fine de agrabla promeno tra la urbo trafis nin forta pluvo kaj ni hastis de apud la katedralo de sankta Barbaro reen al nia aŭtomobilo. Kiam ni tute malsekigitaj fine alvenis al la parkejo, ni havis multe da laboro kun la transvestigado de la infanoj kaj kun metado de malsekaj aĵoj en la valizujon. Dum ĉiu tiu galopo mi rimarkis, ke en la apudstarantan veturilon eniĝas viro kun ŝajne konata vizaĝo.

Topoláneĉ!? Ĉu estas li? Aŭ ne? Post tiuj kelkaj jaroj, ekde kiam li malaperis el la publika vivo, li eble iome ŝanĝiĝis. Ni ĉiuj maljuniĝas. Mi ekzamenis pli atente lian aŭton. Estis granda porkampa Volvo. Tio korespondus, mi diris al mi rememorante iun skandaletan „Volvoláneĉ“, kiun mi reimagis nur nebule. Do li restis fidela al la marko.

Dum mia edzino oscilis ĉirkaŭ la infanoj, mi prenis la poŝtelefonon kaj komencis serĉi informojn, kiuj iomete revivigu mian memoron. Jam la unua trovo konsternis min. Laŭ la fotoj mi ekkonis, ke tio apud ni estas ĉiam la sama Volvo XC 90. Oni ne volis kredi tion. Alie la tuta skandaletto estis nur plumblovita bobelo kiel el iu farsaĵo; hodiaŭ ĝi eble jam neniu levis el la seĝo. Ne, ke ĝi ne estu amuza. Ĵurnalistoj en septembro 2007 malkovris, ke la ĉefministro jam unu jaron veturas en luksa porkampa aŭtomobilo, kiu tamen ne estas registrita je lia nomo. Pruntedonadis ĝin al li la koramikino de la lobiisto Dalík. Malpli frue la aŭton aĉetis Lucie Talmanová, amantino de Topoláneĉ. El akuŝhospitalo oni transportis en ĝi la malgrandan Nicolas.

La aferon oni diskutis eĉ dum interpelacioj en la Ĉambro de deputitoj. Pikante estis, ke tiam aŭdiĝis ankaŭ David Rath, kiu – kiel persono nature la plej kompetenta – deklaris suspekton koncerne eblan korupcion: *„Sinjoro ĉefministro, vi veturis longtempe per relative multekosta porkampa Volvo, kiu apartenis, aŭ pli bone dirite estis registrita je la amikino de via amiko – oni malbone orientiĝas en tio - Dalík. Tamen ŝi havis la aŭton nome de sia firmao, kiu mastrumis kun deficino, simple deklaris komercan mankon. Kiel ni do povas kompreni, kial vi kiel homo, kiu perlaboras 160 000 monate, prunteprenis aŭton de fakte bankrotanta entreprenistino?... Nome tie estas grava suspekto, ke ĉi tiu dubinda, tre kurioza transakcio estis realigita nur por ŝirmi iun bakŝiŝon kaj iu al vi verŝajne la aŭton donacis kaj al vi ĝenis tio, do vi registris aŭ lasis registri ĝin pere de Dalík al ŝia amikino, aŭ eventuale iuj tiaj konstruoj.“*

Al la Volvo subite alkuris malgranda knabo kun pliaĝa sinjoro – eble Nicolas kun sia avo. Topoláneĉ evidente nur atendis ilin. Ili eniris kaj la aŭto post unu momento startis. Kaj halt, kio ne okazis! La knabo malbone

fermis la pordon kaj ĝi, kiam la aŭto ekmoviĝis, malfermiĝis plenlarĝe. La stiranto ne rimarkis tion kaj veturis pluen. Kiam la pordo preteriris nin, ĝi frapis nian flankan retrospegulon ĉe la ŝoforo. La speguleto iomete kliniĝis, poste ĝi revenis en sian pozicion kaj ektremis. Mi en ĝi fascinite observis la forveturantan koloson de la eksa politikisto. Kun ĝi estis malproksimiĝantaj ĉiuj vekiĝintaj rememoroj pri unu erao – Dalík, Večerek, Melčák, Pohanka, Traktado de Lisbono...

La edzino spasme ekskuiĝis, kvazaŭ iu vespego pikus ŝin, kaj pelis min en la fortan pluvon, ke mi kontrolu, ĉu ili ne damaĝis nin. Mi jam imagis, kiel mi devos kuri malantaŭ la grandkapulon, haltigi lin kaj postuli subskribon de protokolo pri la akcidento. Kun malpeziĝo mi konstatis, ke sur la speguleto ne troviĝas eĉ la malplej granda gratvundo. Ŝajne la du aŭtoj nur karesis unu la alian.

Dum mia edzino havis koleron en la okuloj kaj ne trovis por la eksa ĉefministro favoran vorton, mi rigardis la speguleton kaj pripensis tion, kio ĵus okazis. Mi diris: „Ĉu vi konscias, karulin’, ke fakte estas io, kvazaŭ ekkisus nin la historio?“ Do vere, kiu povas diri, ke li koliziis kun aŭtomobila legendo, kiu dum kelkaj semajnoj skuis la ĉeĥan politikan arenon? Ĉu ni povas trovi en nia historio pli interesan veturilon de politika vidpunkto? Por tiu politika romantiko tamen mia edzino ne havis komprenon kaj mi povis ankoraŭ esti feliĉa, ke ŝi ne sendis min al la samaj lokoj, kiel antaŭe Volvolánek-on.

„Kaj paĉjo, kiu estis tiu sinjoro?“ demandis la pli aĝa filo, kiam ni estis elveturantaj el la parkejo.

En mian kapon venis memvole artikoltitolo de unu iam fama bloganto – *Fuŝulo, kiu fuŝis ĉion, kio estis fuŝebla*. Sed mi diris nur: „Estis sinjoro Topolánek.“

---

## **Jungmann en tenebra nokto** *Morgaŭ eble ĉio estos alie*

Tomáš Břicháček

*Ĵaŭdo, la 18-an de januaro 2085, frumatene*

Estis frosta januara mateno, tuj antaŭ la sesa. La ĉielo tenebris kiel noktomeze. Sur la Placon de Homaj Rajtoj en la centro de Prago dense falis neĝo. La vento, kiu blovegis de apud la rivero tra la Avenuo de la Toleremo, rotaciigis neĝoflokojn en imponajn kirlojn. Du horoj ĝis aŭroro – tempo kiel por ekzekuto. Kaj vere io simila okazos! Ekzekuta maŝino, pendigistoj kaj la mortkondamnita jam estas surloke.

Grupeto de laboristoj ĉirkaŭ mobila levigilo nur atendas la ordonon kaj ĉio povas komenciĝi. La labormastro senpacience piedbatetas en la neĝo kaj pririgardas junulon kun multkolora trikĉapo, kiu direktas la agon. Tio estas Tobias Urban, iama progresiva aktivulo, kiun politikaj ŝanĝoj levis al la

posteno de la ĉefo de la politika departemento de la praga urbadministrejo kaj en la urban komitaton de la partio. Li observas la horloĝon kaj zorge kalkulas la minutojn ĝis la sesa. Estas nepre bezonate teni strikte la noktokvieton. Leĝo kaj ordo antaŭ ĉio! Precipe kiam fine regas novaj leĝoj kaj novaj ordoj. La forigo de la monumento de Josef Jungmann estis planita por la frua matena horo kaj la dato ne estis publike anoncita, por ke ĉio okazu glate sen iu ajn komplikajo. Kiam fine de la pasinta jaro estis forŝirita la statuo de Masaryk en Hradĉano, kunvenis tie ne nur konsciaj favorantoj de progreso, sed ankaŭ kelkaj dekoj da demonstraciantoj. La registaro kaj urbadministrejo ne deziris, ke pluraj „sanaciaj laboroj“ kadre de la realigo de la *leĝo pri forigo de la historia ŝarĝo de naciismo* estu perturbita de „ekstremistoj“, kaj do oni elektis pli antaŭzorgan procedon.

Por Urban al kutimiĝinta al varmo, komforto kaj leviĝado ĉirkaŭ la naŭa, lia hodiaŭa tasko estis kruela. Tamen plivigligis lin la konscio, ke li oferas sin por *noble cause*.<sup>2</sup> Realigi la bazan reforman leĝon tiel bezonatan por harmonia kunekzistado de homoj estas ja granda *challenge*<sup>3</sup> kaj granda respondeco. Okazas ĉi tie historiaj procedoj, kiuj staras ĉe la komenco de la konstruo de nova, pli justa mondo kaj de nova homo, kaj li povas ĉeesti. *Yes indeed!*<sup>4</sup>

Kvin, kvar, tri, du... Estas la sesa horo akurate. Urban, tremigita de tikla tensio, donas verdan lumon al la labormastro. Tiu ekkrias al siaj viroj: „*Hadi baŝlayalım!*“<sup>5</sup> kaj la perejo povas eki.

La leĝo parolas klare kaj nekompromise. Publikaj lokoj devas esti ĝis la 31-a de decembro 2087 purigitaj de ĉiuj okulfrapaj simboloj de naciismo – nomoj, monumentoj, memortabuloj ktp. La efektivigo de la leĝo estas tasko de la komunumoj, kiuj devas adaptiĝi al tempe fazigitaj agadoplanoj, kiuj estas aprobatataj de la ministerio pri internaj aferoj.

Dum la laboristoj oscilas ĉirkaŭ la monumento, la juna funkciulo kun granda indigno rimarkas amaseton de homoj malantaŭ la baraĵo apud la Franciskana monaĥejo. Estas proksimume du dekoj da ĝenerale pli aĝaj civitanoj de dignoplena aspekto. Iu tenas ŝtatan flagon, alia grandan transparenton: „**HONTO AL KULTURAJ BARBAROJ!**“ Eĥiĝas eksklamacioj „Malhonoro!“, „Vandaloj!“, „Hontu!“

